

la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia
Printempo de 1989. N-ro 14-a. Jarkolekto 4-a. 0,75 \$



januaro 1989 — MONATO

Ekologia rezolucio

Ni, partoprenantoj de la 29-a Okcidenta Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (1988.08.18-28), reprezentantoj de 43 urboj el ok respublikoj de U.S.S.R., konsciente minacan ekologian situacion sur la planedo kaj potencialan rolon de tiaj internaciaj komunikiloj kia estas lingvo

Esperanto en plibonigo de la situacio, alvokas ĉiujn esperantistojn subteni ekologiajn movadojn, proponante kaj helpante al ili uzi en la internaciaj kontaktoj Esperanton labor- kaj pont-lingve. [El Aveno n-ro 5, jan.-feb.-marto 1989]

Quelques rencontres

Le **Congrès mondial de la jeunesse** aura lieu cet été à Kerkrade, aux Pays-Bas, du 16 au 23 juillet 1989.

Le **Congrès mondial d'espéranto** aura lieu à Brighton, en Grande-Bretagne, du 29 juillet au 5 août 1989.

Si le **vélo** vous intéresse, il y aura deux caravanes vers Kerkrade, l'une à partir de la Norvège, l'autre, de l'Espagne. Ainsi qu'une troisième entre Kerkrade et Brighton.

Si c'est plutôt la **voile** qui vous attire, une semaine de voile en espéranto se

tiendra du 1^{er} au 8 juillet aux Pays-Bas, sur le lac d'IJssel et la mer de Wadden.

Si vous rêvez du **Japon**, sachez qu'un séminaire sur les arts traditionnels japonais aura lieu pour la deuxième fois en espéranto du 10 au 30 septembre 1989, à Kioto, au Japon.

Des renseignements sont disponibles à la Société québécois d'espéranto.

Le mouvement espérantiste permet évidemment de participer à beaucoup d'autres événements. □

la Riverego

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. Eldonkvanto : 300.

Courrier de deuxième classe. Autorisation en cours.

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktanto: Sylvain Auclair.

Kunlaboris Suzanne Bolduc, Kajmo Brent, Normand Fleury, Victor C. Jaar, Manŭelo Kampanjaĥa, Claude Lebus, Régis Ostigny, Cyrille Robidoux kaj U. Paul Ronald.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo. UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0.75 \$, plus sendokostoj.

Limdato por la venonta numero: 1-a de junio 1989-a.

Adreso: Esperanto Societo Kebekia
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal, Québec
KANADO H2G 3C8

Kien la Kanado movado ?

Résumé: ces dernières années, la situation du mouvement espérantiste du Canada semble se détériorer. L'Association canadienne d'espéranto (A.C.E.) est presque inactive et perd des membres, alors que la Société québécoise d'espéranto (S.Q.E.) arrive à croître. En Colombie-Britannique, le président de l'A.C.E. fonde une association, avec des membres en Colombie-Britannique et dans l'État de Washington, qui prend, aux côtés de la S.Q.E., la tâche d'informer le Canada anglais sur l'espéranto. Une association ontarienne va bientôt être fondée. Le Canada est-il donc trop grand (que dire du monde, alors ?), le mouvement espérantiste repose-t-il trop sur quelques personnes, négligeons-nous de travailler ensemble, sommes-nous aveuglés par des faussetés sur le Québec, le Canada et le mouvement espérantiste, l'A.C.E. est-elle vraiment démocratique ? Voici quelques questions auxquelles ont tenté de répondre quelques militants espérantistes québécois, à la demande de la Riverego.

La Esperanto-movado en Kanado trapasas strangan periodon. La membronombro de la Kanada Esperanto-Asocio stagnas kaj eĉ mal-kreskas. Ankaŭ stagnas la anglalingva perpoŝta kurso. De pluraj jaroj, la estraro de K.E.A. aspektas ne tre aktiva. La apero de *Lumo* estas malpli ofta kaj regula ol antaŭe. La taskoj de la Landa Oficejo disiĝis tra Kanado. La Esperanto-Societo Kebekia transprenis, nun oficiale, la taskon informadi pri Esperanto en Kebekio, sukcesas pligrandigi sian membraron, sed penis ricevi la subvencion je 500 \$, kiun decidis doni K.E.A. Fondiĝis nova asocio, Pac-Arka Societo, kun membroj en Brita Kolumbio kaj Vaŝintonio, kiu transprenis, simile kiel E.S.K., la taskon informadi en angla-

lingva Kanado, ĝis Teranovo, kaj ankaŭ ricevos 500 \$ jare. Baldaŭ fondiĝos Ontario Esperanto-Asocio, kiu verŝajne havos la saman taskon en sia provinco, ĉu ne ?

Tial *la Riverego* petis kelkajn Kebekiajn kaj Kanadajn Esperanto-aktivulojn doni sian opinion pri tiu situacio. Kelkaj respondis.

U. Paul Ronald
iama prezidanto de K.E.A.

Mi ne vidas grandan problemon rilate novajn regionajn asociojn. Tamen asocio kun membroj Kanadaj kaj Usonaj [kiel la PacArka Societo, red.] kaŭzas problemon rilate donacojn de K.E.A. En tiu kazo E.L.N.A. devus donaci, ne nepre egale, sed proporcie, laŭ la nombro de membroj Usonaj kaj Kanadaj.



Kial tia okcidenta asocio informadas pri Esperanto en la orientaj ĉemaraj provincoj? Kial ne E.S.K.? — ĝis estos kreita ĉemara regiona asocio. Ja estas membroj de E.S.K., kiuj povas korespondi en la angla. Aŭ la nova Ontaria asocio povus informi en la oriento angla.

Ni tamen bezonas nacian asocion kaj nacian bultenon Esperantlingvan. La propono de S-ro Conrad Fisher [Usona esperantisto, red.] pri Nord-amerika revuo en la angla, la franca kaj la hispana ne taŭgas, laŭ mi. Se oni volas legi nacian lingvon, oni abonu nacilingvan ĵurnalon. Esperanto-asocio presu Esperantlingve. Nia *ESKa Riverego* multe tro uzas la francan. Tio nur kuraĝigas la komencantojn resti tiaj. Kaj kion pri anglalingvaj komencantoj? Ja Esperanto forigas la neceson traduki kaj presi diverslingve. Kial subfosi la propran pozicion?

Laŭ mi ankaŭ ne taŭgas la

propono anstataŭigi LUMOn per eksterlandaj bultenoj el Francujo, Britujo, Usono... Ĉu Meksikio uzu bultenon el Hispanujo? Aŭ Brazilo, el Portugalujo? Laŭ tiu pensmaniero, oni ĉesigu L'ACTUALITÉ kaj MACLEAN'S kaj uzu TIME. La bulteno de E.L.N.A. tro uzas la anglan; kaj oni ne forgesu, ke nia Kanada movado tamen restas pli forta ol la Usona, relative, t.e. se oni konsideras la diferencon en nombroj da enloĝantoj.

Victor C. Jaar
vicprezidanto de K.E.A.

Kanado estas tro granda lando: ne estas facile renkontiĝi, nek fakte komuniki. K.E.A. estas tamen nacia asocio; ĝi reprezentas ĉiujn lokajn grupojn kaj esperantistojn, ĉefe internacie, kaj en pli malpli oficialaj rilatoj kun aliaj similaj naciaj asocioj.

Malgraŭ okazaj sukcesoj en kelkaj partoj de la lando, la nombro de membroj ŝajne

malkreskas de jaro al jaro.

Estas bedaŭro, ke en preskaŭ ĉiu urbo, kie la movado antaŭeniras, la sukceso dependas de la laboro de unu homo; tiel, kiam tiu persono ne plu povas daŭrigi la laboron, Esperanto ne plu progresas loke. Tio okazis, inter aliaj, en Kebeko kaj en Otavo.

Novajn membrojn bezonas ni; samtempe estas necese interesigi la malnovajn!

Fine, Esperanto antaŭen iros. Nia sperto en Kebekio konfirmas tion.

OKEK-krizo

Kajmo Brent estrarano de K.E.A.

La antaŭnelonga, malpublika transdono de la esencaj funkcioj de KEA al du « regionaj » subasocioj, la duonusona PAS (Pac-Arka Societo) kaj ESK, estas frapa simptomo de la aktuala krizo de OKEK (la organizita kanada esperantokomunumo). Tiu krizo mirigas kanadajn esperantistojn kiuj konas la ĝisnunajn atingojn de OKEK kaj la antaŭan bonan funkciadon de ties ĉefa organizo, KEA. Pro limigita spaco mi proponas nur skizan analizon de a) subjektivaj kaj objektivaj faktoroj rilataj al la nuna krizo kaj b) eblaj rimedoj por resanigi

OKEK-on.

Kiel subjektivajn faktorojn krizrilatajn mi citu ses mitojn, kiuj konsistigas malhelpan opinion-klimaton:

1. *La granda de Kanado ne ebligas efikan komunikadon aŭ kunlaboradon inter enlandaj esperantistoj.* Se UEA kaj aliaj tutmondaj esperantoorganizoj povas ja realigi taŭgan komunikadon reton mondskalan, kial tio ne eblas nurkanadskale? Fakte, en antaŭaj jardekoj la interprovinca kunlaborado bone funkciis en KEA.

2. *La du kanadaj lingvoj estas la angla kaj la franca.* Vere tiuj du lingvoj havas oficialan statuson, sed la kanada branĉo de la monda esperantokomunumo ne povas ignoradi ke triono el la kanadanoj estas origine nek angla- nek franclingvaj.


3. *Ni ne bezonas apartan kanadan organizon; nur misnaciismo malhelpas nin amalgamiĝi kun la usona esperantomovado.* Malgraŭ trompimpreso ĉe iuj novkanadanoj, Kanado kaj Usono estas kulture kaj politike tre malsamaj landegoj. Eĉ por intertrakti kun diversnivelaĵoj registaroj utilis havi apartajn landajn esperantoorganizojn.

4. *La sola celo de KEA estas instrui esperanton.* Jen preskaŭ laŭvorte el la nuna KEA-statuto. Bonŝance la plej multaj esperantoasocioj (inkludite de ESK) havas krome celon pli vastan kaj... allogan: nome utiligi espe-

ranton por tutmonda interhoma komunikado.

5. *KEA estas riĉa; ĝi povas pagi.* Efektive OKEK profitis de la malavaro de pluraj riĉaj membroj, tiel ke eblis interalie starigi fondaĵojn kiuj antaŭenigu esperanton en Kanado kaj tutmonde. Sed la regulaj enpezoj de KEA apenaŭ kovras ties elspezojn (aktualaj detaloj estas sekreto eĉ por KEA-estraranoj). Krome, laŭ la komence menciita «regioniga» aranĝo inter KEA, PAS kaj ESK, la fluo de novaj membroj al KEA severe eklimiĝas tial ke novuloj aliĝu al KEA nur post tri jaroj da esperantolernado kaj da aneco en PAS aŭ ESK. [Tio estas nur propono de estrarano, red.] Tiacirkonstance, kiel KEA pagadu la konsentitan subvenciojn al la subasocioj? Ĝi jam ne pagis al ESK 1000 \$, ĉu buĉitan bovinon oni povas melki? Aŭ ĉu oni atendas biblian miraklon de fiŝa multobligado?

6. *La problemo de la kanada esperantomovado estas problemo nur kanada.* Fakte la kanada esperantistaro estas konsistiga parto de la tutmonda esperantokomunumo. Prosperado aŭ stagnado de esperanto en Kanado efikas ankaŭ al la esperantaj medioj eksterkanadaj. Cetere tiuj atendas de la enviinde bonstata Kanado juste kontribuu al la prosperigo de la universala esperantokomunumo.



Membronombro de K.E.A.

Tuta Kanado kaj Kebekio

Kiel objektivajn faktorojn rilate la nunan OKEK-krizon mi prezentas kvar interligitajn misaĵojn:

a) La organiza decidpovo estas tro koncentrita, nome ĉe tre malmultaj individuoj kaj en tre malmultaj lokoj. Spite de surpapere demokratiaj gvidprincipoj statutaj, mankas en la efektiva estrado de KEA traid-eblo, efika interkomunikado kaj aŭtenta demokrateco.

b) Regas rutinmembrecio kaj paraliza indiferento ĉe multaj, eĉ spertaj, KEA-anoj. Tio akcelas la relativan maldemokratecon de la asocio.

c) La kapabloj kaj interesoj de la kanadaj esperantistoj ne estas sufiĉe utiligitaj. Jen pleje informa kaj organiza problemo.

ĉ) Parofismo kaj manko de tutmonda orientiĝo — problemo preskaŭ ĉiulanda — karakterizas ankaŭ OKEK-on. Temas pri la tendenco de la komunumanoj resti kontente ennestigitaj en eta

rondo de lokaj aŭ regionaj verdstelanoj, ne volante interrilati kun la ekstera mondo.

Laŭ la ĉi-supra analizo nature indikiĝas, por forigi la nunan krizon, pluraj rimedoj. Helpus antaŭ ĉio koni la atingojn de OKEK. Inter tiuj mi menciuj nur jenajn :

— Kanadaj esperantokongresoj kiuj frappe transpontis la kanadajn « du solecojn » neŭtrallingve (1959-86) ;

— sukcesa okazigo de du tutmondaj esperantokongresoj (Toronto, 1973 ; Vankuvero, 1984) ;

— funkciigado de altnivela lingva ekzamensistemo (en la 60-aj kaj 70-aj jaroj) ;

— publikigado de periodaĵoj kun internacia renomo (jam en la unua jardeko de tiu ĉi jarcento) ;

— financa subtenado al esperantoprojektoj en pluraj landoj.

Necesas demokratigi KEA-n

per malkaŝa informado al la membroj kaj individua partoprenigo al la asocia agado. Tio implicas ne nur malkoncentradon decidpovan, informpovan kaj monpovan, sed ankaŭ plenan utiligadon de la kontribupovo de ĉiuj membroj kaj restarigon de la ĉiuregiona reprezenteco de KEA.

Necesas plie krei taŭgajn servojn por la kanada esperantistaro ; antaŭ ĉio servojn informan, lingvan kaj pedagogian.

Utilus krome ke KEA ekstarigu aŭ akcelu rilatojn kun la registaraj instancoj en Kanado kompetentaj pri lingvaj, kulturaj kaj edukaj aferoj. Same, ne malplej grave, KEA profitus akcelante siajn rilatojn kun la resto de la tutmonda esperantokomunumo, antaŭ ĉio kun la organiza reto de UEA.

Ĉu OKEK efektive resaniĝos, dependas de ĝia propra konsciigo kaj mobiliziĝo. Almenaŭ oni ne provu buĉitan bovinon melki. □

Deux nouvelles

Après avoir observé la situation actuelle du mouvement espérantiste, Thomas A. Goldman, habitant les États-Unis et espérantiste depuis 1933, a deux nouvelles à communiquer aux espérantistes.

Une bonne et une mauvaise.

La bonne, c'est que l'espéranto est déjà

un succès. La mauvaise, c'est que les espérantistes n'en ont pas encore pris conscience et n'utilisent donc pas la langue autant ils le pourraient et le devraient, et ils ne l'utilisent pas à des fins auxquelles elle conviendrait très bien. [Esperanto, fév. 1989] □

Renkontiĝo en Sankta-Ireneo

La venonta renkontiĝo de E.S.K. okazos dum la semajnfino de la 20-a ĝis la 22-a de majo, en le Domaine Forget, en Sankta-Ireneo, iom sud-okcidente de La Malbaie, ĉe la riverego. Por tiuj, kiuj venos aŭtobuse, eblos organizi transportadon de Baie-Saint-Paul, ĉar neniu aŭtobuso ĉepasas Sanktan-Ireneon.

La kosto estas po 40 \$ por aliĝo ricevita ĝis la 5-a de majo; po 50 \$ por aliĝo ricevita post tiam. La kotizo inkluzivas du trunkotojn en etaj dometoj (tri-aŭ kvin-litaj), kun kuireblecoj, kaj partoprenon. Junaj infanoj

povas aliĝi senpage, sed ili ne ricevos liton nek littukojn. Oni kalkulu ankaŭ iom da mono por manĝado kaj vizitoj.

Programo

Sabata posttagmezo : alveno kaj libera diskutado

Sabata vespero : kultura vespero (ĉiaj proponoj estas bonvenaj).

Dimanĉo : vizito de la regiono, kun piknika tagmanĝo kaj restoracia vespermanĝo.

Lunda mateno : movada diskuto.

Lunda posttagmezo : foriro.

Rencontre à Saint-Irénée

La prochaine rencontre des membres de la Société québécoise d'espéranto aura lieu à Saint-Irénée, quelques kilomètres en amont de la Malbaie, du 20 au 22 mai 1989. Si vous comptez venir en autobus, contactez-nous, on s'arrangera pour venir vous chercher à Baie-Saint-Paul.

pour une inscription avant le 5 mai, 50\$ par personne si vous vous inscrivez plus tard. L'inscription inclut deux nuitées dans un petit chalet (trois ou cinq lits) avec cuisinette et la participation aux activités. Prévoir un peu d'argent pour la nourriture et les visites du dimanche.

Le prix: 40\$ par personne

Programme

Samedi après-midi: arrivée.
Samedi soir: soirée culturelle
Dimanche: visite de la région. À midi, on pique-niquera; le souper aura lieu au restaurant.

Lundi matin: discussion sur le mouvement espérantiste.

Lundi après-midi: départ.

Des cours auront lieu tout au long de la fin de semaine, au besoin. Et on peut toujours poser des questions. □

Aliĝilo al la renkontiĝo en Sankta-Ireneo 1989.05.22-22

Nomoj : _____


Komentoj/Commentaires : _____

Sumo enmetita/somme incluse : _____ \$

[Vous pouvez utiliser un fac-similé — Vi povas uzi kopion de la aliĝilo]

LES STUDIOS
du Domaine

DOMAINE FORGET
St-Irénée, Charlevoix
Québec, Canada
G0T 1V0
(418) 452-3535



Novajoj de la societo

Ĉe ministerio

La estraro akceptis la proponon de Cora O. Brent-Palmer, ke E.S.K. estu agnoskita de la Ministère des Communautés culturelles et de l'Immigration, kiel kultura grupo. Cora esploros plu pri tio.

Informado

Ni fine sukcesis akiri la 500 \$, kiujn K.E.A. decidis subvencii al ni ĉiujare. Pagis la Libroservo. Per tiu mono, la asocio povos farigi **konstantan ekspoziciilon**, startabulojn kun bildoj kaj informoj, kiun ni promenu tra Kebekio. Ĉiaj propono kaj helpo estas bonvenaj. Krome, plu modeste, pluraj membroj, dise tra Kebekio, baldaŭ ricevos **inform-afiŝtojn** por diskonigi Esperanton en sia loĝloko. Ni vidos, kiom tio efikos.

La Riverego estos de nun interŝanĝe sendata al kelkaj aliaj asocioj. Ne nur al K.E.A., al U.E.A. kaj al la revuoj de kiuj ni fontis, sed ankaŭ al francaj kaj franc-belga asocioj (kun kiuj ni interŝanĝos ankaŭ varbilojn), al Nov-Anglio asocio kaj al revuoj kaj bibliotekoj.

La librojn, kiujn ni havas por donaci (Nouveau cours d'espéranto avec ou sans professeur),

ni sendos al urbaj libropruntejoj. Malmultaj kolegioj akceptis ilin...

Somero 1990.

La Universala Kongreso kaj la Internacio Junulara Kongreso okazos en Kubo, en 1990. Tial pluraj Esperantistoj flugos al Nord-Ameriko, kaj kelkaj el ili bonvole vizitus Kebekion, se estus io organizita. Do, la estraro de E.S.K. principe akceptis la ideon organizi eventojn. Tri estis proponitaj: bicikla rond-vojaĝo, aŭtobusa rond-vojaĝo, aŭtobusa veturo ĝis Florido. Ĉiaj propono kaj helpo estas bonvenaj.

La jarkunveno de E.S.K. okazos sabaton, 26-an de aŭgusto, en la Montreala Esperanto-Domo, je la 13-a horo. Ĉiuj membroj estas invititaj.

Kotizperiodo

Ĉu ne estus bona ideo ke la kotizperiodo, anstataŭ esti kalendaraj jaro, estus simple jaro? Nun, nova varbito aliĝinta en septembro membras dum kvar monatoj, dum tiu aliĝinta en oktobro membras dum dek-kvin monatoj! Ni eble eĉ tial perdas membrojn, kiuj ne klare komprenas la sistemon.

La membro-prizorgado ne estus pli komplika, per komput-

ilo. Tamen, la membro-periodo ne kongruus kun tiu de K.E.A. aŭ de U.E.A., sed jam ĉiuj membr-ecoj estas apartaj.

Avantaĝe, la membraro kres-

kus pli regulece, sen la nuna drasta falo, komence de ĉiu jaro. Estus tiel pli facile vidi la progreson. □

Nouvelles de la société

Communautés culturelles

La Société québécoise d'espéranto sera sans doute bientôt reconnue par le Ministère des Communautés culturelles et de l'Immigration comme organisme culturel. Cora O. Brent-Palmer en a fait la proposition et s'occupe maintenant des démarches.

Publicité

Grâce aux 500\$ reçus de l'Association canadienne d'espéranto, le conseil compte faire faire un panneau mobile, ayant pour but de présenter l'espéranto lors des congrès ou dans des lieux publics. Toute idée est bienvenue.

Plusieurs membres recevront bientôt

quelques feuilles sur l'espéranto, pour faire mieux connaître l'espéranto un peu partout au Québec. Il s'agira de les afficher dans des lieux publics, en espérant un effet favorable et important.

Lors de l'été 1990, les congrès universel et jeunesse auront lieu à Cuba. Plusieurs espérantistes européens traverseront alors l'Atlantique, et la S.O.E. en profitera pour organiser quelque chose au Québec. Trois projets sont présentement sur la table: voyage touristique au Québec en autobus, un autre en vélo, descente de la côte jusqu'en Floride, en autobus. Toute idée ou aide est bienvenue. □

Maŝintradukado I

La Riverego jam pritraktis la maŝintradukan projekton D.L.T. Sed jam ekzistas tiaj komputilaj programoj. Ekzemple, pasintjare, la 14-an de julio, francaj policanoj en la gubernio Rhône volis atentigi la germanajn turistojn pri la amasa tiutaga trafiko. Ĉar ili ne povis trovi tradukiston, ili

uzis la per la fama Minitel alireblan traduksistemon SYSTRAN. Tiu sistemo uzas kiel pontlingvon... la anglan. Tio eble povas komprenigi la jenan laŭvortan tradukon en Esperanton de la germana teksto, disdonita al centoj da aŭtistoj:

La Prefect de la Rhone donas al ili la sekvantaj konsilistoj:

1) Sur la straisoj aŭ la aŭtoŝoseo, se ili

a) antaŭ ol la elirejon

- ne forlasi, se ili ne estas remetataj

- ĉiam fiksi siajn infanojn al la malantaŭa parto de la vehicle

b) Sur la straiso:

- limigi siajn goingojn transe;

- prevoyez halte;

- ili interdisez iu alkohol-brulaĵ-konsumo kaj kultivitaj helaj menuoj;

- blejvi la paciento kaj heziti nihile, utiligi la diversajn vojojn de la malbalastingo, kiujn ili.

[laŭ Monato, decembro 1988]

L'espéranto et les voyages

Cet article est le dernier d'une série de quatre reprenant le texte de quatre feuillets d'information publiés par la Société québécoise d'espéranto. Ils offrent une vue générale sur divers aspects du mouvement espérantiste. D'autres feuillets seront peut-être publiés sous peu.

Un des grands avantages de l'espéranto est l'aide qu'il peut apporter aux touristes. Il n'est donc pas étonnant que les espérantistes soient parmi les personnes qui voyagent beaucoup.

L'Association mondiale d'espéranto et son *Jarlibro*

Les membres de l'Association mondiale d'espéranto (Universala Esperanto-Asocio: U.E.A.) reçoivent chaque année le *Jarlibro*, ce qui signifie *annuaire*. Ils peuvent y trouver de nombreux renseignements propres à faciliter leurs déplacements à l'étranger. La première partie du *Jarlibro* présente les principales associations espérantistes mondiales, ainsi que les divers organes et institutions de l'U.E.A.

La deuxième partie, la plus importante, présente le *Delegita Reto*. Il s'agit d'un réseau de quelques milliers de personnes *déléguées*, classées par ville et par pays. Ces délégués sont prêts à

fournir gratuitement des renseignements de tous ordres aux membres de l'U.E.A. Bien que ce ne soit pas dans leur mandat, beaucoup de délégués sont aussi prêts à aller chercher quelqu'un à la gare, à le dépanner en cas de pépin, ou à servir d'interprète dans des situations difficiles (comme à l'hôpital). D'autre part, certains délégués se disent officiellement prêts à héberger des voyageurs.


L'Organisation mondiale des jeunes espérantistes et son *Pasporta Servo*

Dès les débuts de l'histoire de l'espéranto, des correspondants ont effectué des ententes d'hébergement mutuel: «*Cette année, je vais dans ton pays et tu m'héberges gratuitement; l'an prochain, je t'accueillerai.*» Ce système, malgré ses avantages révolutionnaires, ne convenait qu'aux voyageurs qui avaient la possibilité d'héberger en retour.

Depuis plus de dix ans, on a généralisé

et étendu ce système en éditant annuellement le *Pasporta Servo* (service passeport). Destiné avant tout, mais non exclusivement, aux jeunes espérantistes, ce service est utile à ceux qui veulent voyager à peu de frais et rencontrer les gens du pays, voir autre chose que les hôtels classiques ou que les auberges de jeunesse remplies de... touristes.

Concrètement, il s'agit d'une liste comportant les adresses de plus de 900 personnes (les hôtes), réparties dans une soixantaine de pays et prêtes à héberger gratuitement tous les espérantistes — il



La liste des hôtes du *Pasporta Servo* est disponible à la Société québécoise d'espéranto (S.Q.E.).

Les deux grands congrès mondiaux

Le *Jarlibro* et le *Pasporta Servo* servent principalement aux voyageurs indépendants. Mais le mouvement espérantiste offre aussi aux espérantistes du monde entier des occasions de se rencontrer. Les deux plus importants rassemblements annuels sont sans aucun doute le *Congrès mondial* et le *Congrès mondial de la jeunesse*.

Ces deux événements durent chacun une semaine, ont lieu en juillet et en août, chaque année dans un pays différent (les deux sont souvent dans le même pays). Le Congrès est la réunion officielle du mouvement espérantiste mondial. On y organise des conférences, des cours, et beaucoup d'activités culturelles. C'est l'occasion d'un très grand nombre de rencontres personnelles et d'échanges amicaux entre les milliers de participants.

Le Congrès mondial de la jeunesse est un peu plus modeste et réunit quelques centaines de personnes. On y tient de nombreuses séances de discussion, sur des sujets très divers. Véritable bain multiculturel, le Congrès de la jeunesse est l'occasion privilégiée pour se faire des amis aux quatre coins du globe.

faut savoir l'espéranto pour cela — membres du service, qui ont acheté la liste (environ 5 \$). Les conditions et la durée de l'hébergement varient selon les personnes. Le voyageur doit prévenir son hôte par la poste, par téléphone ou même en frappant à sa porte (selon les hôtes). Les hôtes peuvent exiger un dédommagement pour la nourriture. Certains vont jusqu'à vous payer les visites touristiques. Pour les hôtes, recevoir des voyageurs, c'est un peu voyager tout en restant chez eux.

Autres rencontres

Il est impossible de répertorier toutes les rencontres espérantistes, même les plus importantes. Et il s'en rajoute chaque année. En voici tout de même quelques exemples :

- Plusieurs associations mondiales et nationales ont leur propre congrès.

- Les espérantistes de l'Allemagne de l'Ouest organisent chaque hiver un *Séminaire international*, un peu le pendant hivernal du Congrès jeunesse.

- Les Suédois, les Français, les Allemands, et d'autres organisent leur festival culturel espérantiste. Beaucoup d'organisations nationales nous convient à des rencontres touristiques, des vacances de ski et bien d'autres activités.

- Dans beaucoup de pays, on propose des camps de vacances (chantiers internationaux) pour les jeunes, certains très peu coûteux en raison du travail que les stagiaires doivent y faire.

- Des séminaires sur de nombreux sujets, souvent reliés au problème linguistique mondial, ont lieu un peu partout, qu'ils soient organisés par l'Académie chinoise des sciences, par l'Université (espérantiste) de Saint-Marin, ou par une autre organisation.

Des centres espérantistes

Il existe en Europe trois centres espéran-

tistes: à la Chaux-de-Fonds, en Suisse; à Pisanitsa, en Bulgarie; et à Grésillon, en France. Les deux premiers sont ouverts toute l'année, le dernier, seulement l'été. Ils offrent des cours d'espéranto et diverses autres activités culturelles ou touristiques, sans oublier la possibilité d'y être simplement hébergé.

Un voyageur au long cours

Grâce au mouvement espérantiste, un États-Unien a pu effectuer, en dépensant

très peu d'argent, un voyage de 37 mois en Europe et en Asie. Sur les 1130 nuitées qui ont constitué son voyage, 439 (plus du tiers) ont été passées chez plus de 150 espérantistes, 333 dans des centres espérantistes et 156 dans des congrès ou des rencontres espérantistes ! En trois ans de voyage, il n'a pas pu visiter toutes les personnes qui l'avaient invité. Grâce à l'espéranto, il a pu réaliser un rêve qu'il caressait depuis 11 ans. □


De par le monde

Cyrille Robidoux

Conférences

Les Nations-Unies planifient pour cette année 303 conférences internationales dans différentes parties du globe. Pour 142 de celles-ci, soit 47 p. 100, on aura besoin d'interprètes, souvent entre les six langues officielles des Nations-Unies: l'anglais, l'arabe, le chinois, l'espagnol, le français et le russe.

Monato, décembre 1988



Plus de brouillage

Les émissions des stations de radio américaines, Radio Europe Libre et Radio Liberté, ont pu être captées sans brouillage en Union Soviétique pour la première fois depuis trente ans. Les Soviétiques ont cessé de brouiller les émissions le 29 novembre 1988. Mais en Bulgarie et en Tchécoslovaquie, on n'a pas encore cessé de brouiller les émissions américaines.

Monato, décembre 1988

Langue et politique

Dans l'édition allemande de la revue «Union soviétique aujourd'hui», on rapporte le souci de quelques scientifiques et artistes soviétiques connus, qui se plaignent que la langue russe est inondée de mots étrangers. La revue cite l'académicien Vassili Michin, qui croit qu'on devrait interdire certains mots étrangers et leur trouver un équivalent russe. L'auteur dramatique Viktor Rozov a une autre position dans cette affaire. Il affirme que si la langue russe est aujourd'hui une grande langue, c'est justement parce qu'elle s'est enrichie de mots provenant d'autres langues. Il met en garde ses confrères afin que ne soit pas refaites les erreurs des années 1940, période durant laquelle l'Union soviétique a vécu dans un isolement culturel presque complet.

Monato, décembre 1988

L'anglais, langue de communication?

Le canal de cablodistribution de langue anglaise en Europe, *Sky Channel*, ne sera désormais plus capté en Autriche et bientôt en Allemagne Fédérale.

[suite à la page 16]

Montrealaj paĝoj

de Silvano Auclair
kaj Reĝo Ostigny

Por ke la renkontiĝoj de M.E.K. estu pli bone preparitaj, longaj, allogaj kaj homplenaj, la estraro decidis, ke ili estu pli maloftaj. Tion ni decidis en kunveno ĉe Silvano Quirion, kie ni lastatempe kunvenis pro neblo pagi la kostojn petitajn de Centro Saint-Denis. Nu, la klubo formale kunvenos ĉiun trian monaton, ĉe la sezonŝanĝiĝoj. La venonta kunveno okazos sabaton, 17-an de junio de 1989. La loko estas anoncota.

Ĉu ni vidos nin tiel malofte? Tute ne! Ni unue devos prepari la kunvenon kaj kunvenos tiucele. Verŝajne estos kanzonado (kontaktu Silvanon Quirion, 525-1679). Ankaŭ, por plibonigi praktiki Esperanton, la MEKestraro proponas organizi teatrajn ludojn. Tiuj, kiujn tio interesas, komuniku kun Reĝo, per la telefonnumero 661-9258. Ni akceptas ĉiujn proponojn kaj Esperantistojn. Eble tiujn teatraĵojn ni povos prezenti al la tute Kebekia Esperantistaro!

Cetere, por plifaciligi la kontaktojn inter la Montrealaj Esperantistoj, ĉiuj MEK-anoj baldaŭ ricevos liston de tiuj. Ni kunvenu malpli formale.

Pri la libraro de M.E.K., kaj ankaŭ pri la revuoj (M.E.K. nun abonas *Monaton* kaj *Heraldon de Esperanto*), oni kontaktu Silvanon Auclair (270-8856). La libroj daŭre estas ĉe la Montreala Esperanto-Domo.

Ni memorigas vin, ke ĉiuj povas aliĝi al M.E.K. pagante la kvin-dolaran kotizon al la adreso de E.S.K.

En français: le Club d'espéranto de Montréal se réunira désormais tous les trois mois, mais ses membres actifs se réuniront beaucoup plus souvent. On veut même monter une petite pièce de théâtre. Pour plus de renseignements, contacter une des personnes dont le numéro de téléphone apparaît ci-haut, et puis devenez membre du Club, au coût de 5\$.

Kio estas MEKI ?

de Normando Fleury

MEKI estas mallongigo por Montreala Esperanto-Klubo Internacien. Mi pretas kunordigi kunvenojn, kiuj celus ĝemeliĝon de MEK kun Esperanto-grupoj en la 12 ĝemelaj urboj de Montrealo (Ŝanhajo, Rigo, k.t.p.). La celo de la kunvenoj estos prepari materialon (leterojn, kasedojn) interŝanĝeblan kun tiuj foraj ĝemelurboj kaj ekigi regulajn kontaktojn.

Tiuj, kiuj ŝatus MEKI-aniĝi aŭ simple aŭdi pri la nova kunvengrupo estas bonvenaj ĉeesti la unuan kunvenon, lundon 24-an de aprilo 1989 ĉe Montreala Esperanto-Domo, 6358, Bordeaux-strato. La sekvaj kunvenoj okazos ĉiam la lastan lundon ĉiumonate. Bonvenu alveni je la 19h30 sed ne antaŭe ĉar mi devas endormigi miajn idojn

MEKI quoi?

MEKI, c'est l'abréviation pour Montreala Esperanto-Klubo Internacien. Je suis prêt à coordonner des rencontres qui viseront à jumeler le Club d'espéranto de Montréal avec les clubs d'espéranto situés dans les villes jumelles de Montréal (12 villes à travers le monde, dont Shanghai, Riga). Si vous êtes intéressé par l'idée, la première rencontre aura lieu le lundi 24 avril 1989 au 6358, rue de Bordeaux, à Montréal. Le soirée débutera à 19h30. Bienvenue aux anciens et aux nouveaux membres de MEK.

Suite de la page 14

De par le monde

La raison: un trop grand déficit pour le peu de croissance du nombre des abonnés. Le président de *Sky Channel* explique cette situation par le fait qu'il n'y a pas suffisamment d'Autrichiens et d'Allemands qui maîtrisent assez bien la langue anglaise pour profiter pleinement des émissions proposées. *Sky Channel* sera remplacé par le canal *Eurosport* qui ne diffuse que des émissions de sport 18 heures par jour.

Monato, novembre 1988

Tradition orale

La seule suite malheureuse de la disparition de l'analphabétisme en Europe est la perte de la tradition orale et de la culture folklorique. Les Irlandais le regrettent fortement et désirent remédier à cette situation, du moins dans le domaine de la tradition musicale qui est encore très vivante dans le pays. Ils ont donc fondé *Les archives de la tradition musicale*. Ils espèrent que les amateurs de tradition orale dans les autres pays imiteront leur initiative et établiront de telles archives.

Monato, janvier 1989 □

Kulturaj novaĵoj

de Klaŭdo Lebuis

Skribistino anhelanta ĉe televido

Lastjanuare, Hélène Blais prezentis sian poemaron *Scribe haletante* kaj la esperantan tradukon, *Skribistino anhelanta*, dum la drat-televida elsendo «Écriture d'ici» de Vidéotron. La aŭtorino multe parolis pri Esperanto kaj ĝia literaturaj kvalitoj. La poetino fine legis sian franclingvan poemon, titolita «Sages-femmes», de kiu Éditions du Pôle faris afiŝon en 1987, entenanta la poemon, ĝian esperantan tradukon kaj surlignan gravuron de Monique Dussault, la direktorino de Éditions du Pôle.

Donaco de artaĵo

Incidente, tiun poemo-afiŝon la Asocio de Kanadaj Genegocistoj (Association des hommes et femmes d'affaires du Canada) donacis al S-ino Louise Robic,

Kebekia ministrino pri Kulturaj komunumoj kaj enmigrado. Esperanto estis tute inda por reprezenti la plurkulturecon de la Asocio, speciale de ĝia Montreala sekcio, kiu arigas plurajn enmigrintajn genegocistojn. Ĉi-okaze, oni prezentis Esperanton kiel «la lingvon de Unuiĝintaj Nacioj»... La popola saĝo parolis...

La poemo-afiŝo estos bele lokita, en la oficejo de ministrino Robic.

Libro-reklamo en Esperanto

London, la 13-an de februaro 1989, sur la unua paĝo de *Le Devoir*, la Eldonejo *Guernica*, kiu eldonas verkojn de geverkistoj el pluraj kulturaj horizontoj (en la franca kaj la angla), reklamis kelkajn poemarojn per okulfrapa Esperanta slogano. □

POEZIO: KULTURKRUCADO *

*En espéranto

La poésie: le croisement des cultures

CHEZ GUERNICA

La vojaĝanto

de Apolinario

Apolinario naskiĝis en Romo en 1880. Lia fraŭlino-nobelino-patrino, vera etnolingva salato, nomiĝas Anĝeliko de Kostrovicko, kaj Vilhelmo de Kostrovicko li restos por kaj ŝi kaj la pasporto kaj la franca armeo, en kiun li soldatiĝos dum la Unua Mondmilito. Oni renomas lin en Italio Guljelmo kaj en Francio Gijomo; Apolinario venas el la salato de person-nomoj, kiujn oni registris ĉu ĉepolice ĉu ĉepreĝeje ĉu ĉenotarie post lia naskiĝo.

Li frekventas diversajn kolegiojn en Monakio, Kanurbo kaj Nico, kie lia patrino provas reriĉiĝi ĉe la kazinoj. Li laboras kiel unue privata instruisto en Germanio, poste banka dungito en Parizo, fine ĵurnalisto kaj libreja kompilisto, antaŭ ol fondi art-revuon. Ekde 1909 li dediĉas sin al beletro.

Aperas prozaĵoj en 1909 kaj 1910 kaj en 1911 *La Bestaro* aŭ la *Orfea Akompanantaro* kaj *Alkoholajoj* en 1913. Soldatiĝinta en la Franca Armeo en 1914, li revenas Parizon en 1916 pro grava kapvundo. Tiam li aperigas *La Murditan Poeton* en 1916 kaj la dramon *La Mamojn de Tirezio* en 1918. La naŭan de novembro de 1918 li mortas pro tiel nomita hispana gripo. Sammonate sursceniĝos lia dramo *Kolor' de l' vetero* kaj aperos *Kaligramoj*, poemaro verkita en la tranĉeoj.

Jen fama poemo el *Alkoholajoj* – poemaro, kiun li verkis post restado en sentoksigejo. Notu, ke *ĉasputoro* kaj *erinaco* estas ĉi tie slangajoj por respektive: *porcelanpeniko* kaj *fulgoskrapilo*.

Al Fernando Fleŭreta

Malfermu ĉi pordon kie mi plorante frapas

Vivo tiom variemas kiom Eŭripo

Vi rigardis nubaron malsupreniri
Kun la forlasita pasaĝerŝipo al la estontaj febroj
Kaj pri ĉiuj tiuj bedaŭroj pri ĉiuj tiuj pentoj
Vi ĉu memoras

Ondoj arkaj fiŝoj supermaraj floroj
Iun nokton jen estis maro
Kaj la riveregoj en ĝin verŝiĝis

Mi memoras tion mi ankoraŭ memoras ĝin

Iun vesperon mi ekloĝis en malgaja gastejo
Apud la Luksemburg-Parko
En la fondo de la salono ekflugadis Krucumito-bildo
Iu havis ĉasputoron
Aliulo erinacon
Oni ludis kartojn
Kaj vi vi jam forĝesis min

Vi ĉu memoras la longan orfarecan stacidomaron
Ni trairis urbojn kiuj la tutan tagon rendiras
Kaj dumnokte vomadis la sunlumon de l' tagoj

Ho ŝipanoj ho malhelaj virinoj kaj vi miaj kunuloj
Memoru vi ĝin

Du ŝipanoj kiuj neniam sin forlasis
Du ŝipanoj kiuj neniam sin parolis
La pli juna mortante falis sur sia flanko

Ho vi karaj kunuloj
Elektraj sonoradon en la stacidomoj kanto de rikoltmaŝinoj
Glitveturilo de iu viandisto regimento de l' sennombraj stratoj
Kavalerio de l' pontoj plumbokoloraj noktoj de drinkado
La urboj kiujn mi vidis vivis kiel malsaĝulinoj

Vi ĉu memoras la antaŭurbojn kaj la ĝeman gregon de l' pejzaĝoj

La cipresoj jetis sub la luno siajn ombrojn
Mi aŭskultis tiun nokton ĉe l' dekliniĝanta somero
Iu birdo melankolia kaj konstante incilita
Kaj la eterna bruo de larĝa kaj malhela riverego

Sed dum elfluejen svenante ruliĝis
Ĉiuj rigardoj ĉiuj rigradoj el ĉiuj okuloj
La bordoj estis forlasitaj herbokovritaj silentaj
Kaj sur la alia bordo la monto klare videblis

Tiam senbrue sen ke videblu io ajn viva
Sur la montflanko pasis viglaj ombroj
Subite alprofilturnante siajn svagajn vizaĝojn
Kaj antaŭtenante siajn ombrolancojn

La ombroj kontraŭ la vertikala monto
Abrupte plialtiĝis au fojfoje malplialtiĝis
Kaj tiuj barbhavaj ombroj homece ploris
Glitante paŝon post paŝo sur la hela monto

Vi kiun do rekonas sur ĉi antikvaj fotoj
Vi ĉu memoras tiun tagon kiam abelo falis en fajron
Tio okazis vi memoras somerfine

Du ŝipanoj kiuj neniam sin forlasis
La unuenaskito ĉekole surhavis serĉenon
Li pli juna kunigis sian blondan hararon en plektaĵon

Malfermu ĉi pordon kie mi plorante frapas

Vivo tiom variemas kiom Eŭripo

Tradukis kaj enkondukis Manŭelo Kampanjaña

La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia
Printempo de 1989. N-ro 14-a.

Ĉi-numere :

Kulturaj novaĵoj

Kien la Kanada movado ?

Venez tous a Saint-Irenee

L'esperanto et les voyages

La voĵanto de Apolinario

Société québécoise d'espéranto
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montreal H2G 3C8